# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 27/05/2021 Kvincenttridekdua eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron


Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Entute 808,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo




Nun studas **278,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **232,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **209,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **89,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde septo 2021)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).




N.ro 36 de "Por Komencantoj".



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). La normala vortspeco de la kernvorto de gramatikaj subjekto kaj objekto estas substantivo (aŭ infinitivo). De kiu vortspeco estas la kernvorto de la sekvanta subjekto kaj objekto en "Kiom da pomoj estas en la ŝranko?" kaj "Ni manĝis hieraŭ multe da pomoj."

2). Ĉu la predikato povas manki en frazo?

3). De kiuj frazpartoj la infinitivo povas esti kernvorto?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 532. *Marcel Leereveld.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***



**_La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.**

http://esperantaretradio.blogspot.com.



Beleco de parolo venkigos la lingvon 20a Majo 2021

# Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.



**Mia 90a naskiĝfesto.** Roger kaj edzino Mei, la du plej aĝaj filoj kaj iliaj edzinoj kaj unu nepo. Bedaŭrinde multaj familanoj pro la virsuo ne povis ĉeesti, nur tiuj kiuj loĝas proksime.



**Mia 85a naskiĝfesto** antaŭ kovidaj limigoj. Kompreneble estas pli da genepoj/pranepoj post aliaj 5 jaroj.


***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# El Melburno





Estas kun granda plezuro ke la Melburnaj Esperantistoj gratulas Roger por atingi sian 90an naskiĝtagon. Ni deziras al li multe pli da jaroj kun feliĉo kaj plezuro. Ni dankas lin pro lia laboro ne nur por la Aŭstraliaj Esperantistoj sed ankaŭ pro lia malavara laboro kiel prezidanto de la NSW Federacio kaj zorgo por la Esperanto Domo. Vivu longe Roger !! *Heather Heldzingen*



Kara Roger,
Mi esperas ke same kiel en Melburno, la suno brilas en Manly por celebri vian naskiĝtagon
Feliĉan naskiĝtagon al vi mi deziras, multe da energio por daŭrigi vian bonan laboron, kaj paciencon kun la modernaj teĥnikoj
*FranciskaToubale*



# El Brisbano

Kara Roger,
La anoj de la Brisbana Esperanto Societo tre kore gratulas vin je via naskiĝtago. Ni esperas, ke vi bone festos ĝin kun viaj amikoj kaj amantoj kaj ni deziras al vi ankoraŭ multajn ĝojajn naskiĝtagojn en la estonteco!
Krome ni volas diri, ke ni tre dankas al vi pro viaj penadoj de la daŭra farado de la "Aŭstraliaj Esperantistoj". Mirinda!
Amike, *Doug Eising* (prezidanto de BES)



# El Nederlando

***Korajn Gratulojn Honore de via naskiĝtago Je la 22-a de majo***
***Ĝuu agrablan tagon !*** Sincerajn salutojn, *Det Koning*, Nederlando

# El Londono

Kara Roger, mi ĵus legis ke la 22-an vi iĝos 90-jara. Mi sendas al vi miajn bondezirojn, sed mi kredas, ke mi devas sendi al vi ankaŭ bondezirojn nome de ĉiuj esperantistoj tra la mondo, ĉar vi estas al ĉiuj la vivanta kaj vigla fenestro de Aŭstralio por ili. Amike
*Renato Corsetti*



# El Budapeŝto

Estimata Sinjoro!
En la nomo de Esperanto klubo de Albertfalva (estas parto de Budapeŝto, Hungario) mi deziras al vi ĉion bonan por via 90a naskiĝtago. Bonan sanon, ĝojon, feliĉon, sukcesojn!
Amike *Júlia Szalainé Tímár* gvidanto de la klubo

# El Adelajdo

Kara Roger,
Unu minuton post meznokto .... mi esperas ke mi estas la unua.
Kompreneble, mi serioze pensas pri, mi memoras kelkajn momentojn kun vi, kiel tiun kaj mi deziras al vi **F E L I Ĉ A N D A T R E V E N O N D E V I A N A S K I Ĝ T A G O**

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Kia atingo! Mi tre esperas ke "ili" serioze festas, honoras kaj admiras vin.

Multajn dankojn pro via granda stako de kontribuoj al nia bela lingvo, speciale via longjara eldonado de "Aŭstraliaj Esperantistoj".
Jen ankaŭ **gratulmesaĝo de kelkaj esperantistoj** al vi. Ni registris ĝin antaŭ nia lasta sesio de nia prelegserio.(16/5)
Restu sana! Vivu longe! Eldonu pli da AE! Brakume, *Sandor Horvath*




Kara Roger,
Elkoran gratulon al vi okaze de via 90-a naskiĝdatreveno! El via aspekto kaj laŭ via aktivado mi certe ne divenus, ke vi atingis jam 9 jardekojn. Mi deziras al vi bonan sanon, multe da energio kaj optimismon. Ĝuu viajn venontajn jarojn!
Amike, *Katja Steele*




Kara Roger
Mi deziras al vi multan feliĉon okaze de via granda tago hodiaŭa plej amike *Bob Felby*



**Kaj aliaj..** en AE531 kaj de familaj membroj kaj esperantaj amikoj kiuj ne deziras ke mi metu ilian mesaĝon en la novaĵleteron. Dankon *Roger Springer*



# Oni ofte forgesas ke maljunuloj spertis junecon kaj junuloj spertos maljunecon.




Mi bone memoras kiam mi estis la junulo inter la Esperantaj amikoj. *Roger Springer*




Mia ĝardeno antaŭ de mia domo

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★


***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Maja kunveno en Adelajdo

Naŭ esperantistoj kunvenis en la komunumejo de Black Forest la 12-an de majo. Carol Linnane elektis prezenti al la ĉeestantoj iom pri Samuel Pepys (1633-1703) kaj lia milpaĝa taglibro, bone konata inter la britoj. Pepys laboris por la brita mararmeo kaj en siaj malfruaj jaroj iĝis parlamentano. Li regule kaj tre detale verkis siajn tagajn notojn en aparta stenografia skribmaniero. Tamen, apud la manuskripto li postlasis ankaŭ la stenografian gvidilon evidente intencante, ke la postaj generacioj legu lian verkon. Ĝi priskribas inter aliaj la grandan fajron de Londono (1666), sed ankaŭ liajn aventurojn kun virinoj.

Carol preparis kelkajn mapojn kaj fotojn kaj alportis la taglibron mem. Estis tre interese.

Surfote: Carol Linnane



Brendan Linnane kaj Charles Stevenson



Amike *Katja Steele*






Denove nia BES kunveno estas dimanĉo je la 14:00h en bela Brizbano. Gastoj estas bonvenaj ĉiutempe. Ni provos ludi skablon en Esperanto. Tio estos la unua fojo. Bonvolu admiri mian delikatan orkidon.

*Petro Danzer*



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917



# La fabrikoj bezonas vendi siajn armilojn!

## LA MILITO EN GAZA.

Ĝi estis nek estas kontentige solvebla, kiel pluraj aliaj situacioj en la mondo. Do ĝi devas solvati nekontentige same por ambaŭ flankoj. Sed nek la israelanoj nek la palestinanoj akceptas tion: ili pensas ke ili estas sufiĉe fortaj, militarisme, por mem ekhavi ĉiujn avantaĝojn, Israelo pro la helpo de Usono, kaj Palestino pro la helpo de la ekstremismaj islamaj organizoj, kiel Hamas.

La problemo iom kontentige estus solvita, se tuj post la kreo de Israelo la palestinanoj estus akceptintaj la ekziston de Israelo, estus kreintaj amikajn rilatojn, precipe komercajn, kaj estus rifuzintaj la enmiksiĝon de Hamas k,t,p. En tiu kazo la Westbank, la okcidenta lagobordo, restus en la manoj de la palestinanoj sed havus ekonomion favoran al la ekonomio de Israelo. La Westbank estus ankaŭ amika loko por la israelanoj por pasigi siajn feriojn. Nun tiu komerco inter Israelo kaj la arabaj landoj ĉirkaŭ ĝi estas farata de la palestinanoj kaj jordananoj en la “Eastbank” (orienta lagobordo), sur jordana teritorio. Anstataŭ en la Eastbank, la Westbank estus floranta en palestina posedo, amika al la judoj. Sed oni permesis al Hamas k.t.p. fari tie militon al Israelo, kaj tio donis al tiu ĉi la ŝancon okupi la Westbank, kaj enigi ĝin en la israelan ŝtaton. Mi vojaĝis en la Eastbank kaj trovis ke la tieaj jordananoj kaj palestinanoj ne estas kontraŭisraelaj. Kaj religie ili ne estas fanatikaj, kaj pluraj eĉ senreligiaj. La plejmulto de la jordananoj estas demokratema.

Sed nun la Westbank estas kaj estos definitive israela, kaj la palestinanoj neniam retroricevos ĝin. Kaj ree la neŭtralaj landoj en la mondo devos helpi, ke la nuna situacio fariĝos paca, kaj tio eblos nur se la gazaanoj forpelos Hamas el sia teritorio kaj rilatas al Israelo pace kaj komerce. *Marcel Leereveld.*

## NI TROUZAS NIAN PLANEDON.

Nia trouzo de artikloj kaŭzos ke estontece mankos al ni tiuj dezirataj artikloj. En Aŭstralio tio okazas ankaŭ ĉe la konstruado de novaj domoj kaj precipe pro la malkonstruado de malnovaj domoj. Tion kaŭzas la fakto, ke ni aŭstralianoj donas tro da potenco al la kapitalistoj, eĉ pli ol en Usono. Ni, aŭstralianoj, do tre helpas la detruon de nia planedo, ĉar oni donas al konstrukompanioj la rajton malkonstrui uzeblajn domojn. Ĉio kio estas uzebla devas ne esti detruata. Vi eble pensas ke tiu malkonstruado estas necesa aŭ eĉ utila, ĉar sur la grundo oni konstruas pli altajn domarojn. Sed oni ne plu havas uzeblan malnovan domon. En eŭropaj landoj oni kutime, kelkloke eĉ devige, lasas la bonan domon malnovan kaj konstruas novajn domarojn apude. Ekzemple en Amsterdamo oni ne rajtas detrui uzeblan domon malnovan. Kiam infano mi loĝis en vojo kiu iris el la urbcentro al proksima vilaĝo. Ambaŭflanke troviĝis kampoj kun malgrandaj farmoj. La loĝejoj de tiuj farmistoj, kaj la ordinaraj domoj, staris sur la flankoj de tiu vojo. Mi loĝis en unu, vidante la bovinojn. Sed poste, kiam mi loĝis en Aŭstralio, mi vizitis la vojon kaj mian loĝejon. La herbkampoj por la bovinoj ne plu ekzistis, kaj oni tie konstruis pluretaĝajn domarojn, sed la malnovaj domoj, inkluzive de la farmodomoj, plu staris tie, sendube kontraŭ la amo de la konstrukompanioj. Sed la nederlandanoj plimalfortigis ilian malkonstruoamon kaj ne permesas malkonstruojn. Kaj ankaŭ en aliaj landoj eŭropaj tio okazas. *Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

1. La domaj prezoj suĉas Aŭstralion
2. Repuŝo kontraŭ la unuflanka ĉina rakonto, kiu provokas militon
3. ktp [(enudgemail.com.au)]



**3ZZZ** Vi trovos informojn pri kio okazas en Esperantujo , pri la itala poeto Dante kaj pri kiel meduzoj povas helpi la homojn anstataŭ ĝeni ilin en la elsendo de la 24a de majo 2021… ….*Franciska Toubale*




*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)* **SOLVO DE LA KVIZETO 36**

1). Adverbo.
2). Ne.
3). De la subjekto kaj de la objekto.

*Marcel Leereveld.*

GT Voice: Moment of reckoning over Morrison's diplomatic failure with China **?** - Global Times




Alia perdo de la diplomatia fiasko de Morrison kun Ĉinio ?

**Revenu al la antaŭa normaleco?**
**La mondo ŝanĝiĝas.**
**Kio estos la normaleco estonte?** *Roger Springer*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***